



BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

Baza Literatura Krestomatio

**4a eldono
korektita kaj kompletigita**

**Sezonoj
Litova Esperanto-Asocio
2019**

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

4a eldono, korektita kaj kompletigita

1a eld. Budapeŝto: HEA, 1979.

2a eld. Budapeŝto: HEA, 1982.

3a eld. Budapeŝto: HEA, 1986.

4a eld. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2019.

Kompilis: *Vilmos Benczik* (eld. 1-3), *István Ertl*, *Aleksander Korĵenkov*, *Russ Williams* (eld. 4)

Redaktis: *Vilmos Benczik* (eld. 1-3), *Aleksander Korĵenkov* (eld. 4)

La biografiojn kompilis: *Vilmos Benczik* (eld. 1-3), *Halina Gorecka*, *Aleksander Korĵenkov* (eld. 4)

Kompostis kaj korektis: *Halina Gorecka*

Enpaĝigis: *Aleksander Korĵenkov*

Prolegis: *Russ Williams*, *José Antonio Vergara*

La kovrilon kreis: *Vladimiras Beresniovas*

Baza Literatura Krestomatío / Komp., red. Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov; Enkond. Vilmos Benczik; Biografioj: Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. — 4a eld., kompl. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. — 368 p.; 500 ekz.

© La aŭtoroj de la verkoj

© Benczik V., kompilado, 1979

© Korĵenkov A., kompilado, 2019

Leidinio bibliografiné informacjia pateikiama

Lietuvos nacionalinės Martyno Mažvydo bibliotekos

Nacionalinės bibliografijos duomenų banke (NBDB).

ISBN 978-609-95087-7-1

Leidžia Lietuvos esperantininkų sąjunga, L. Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas.

Spaustuvė “Morkūnas ir Ko”, Draugystės 17, LT-51229 Kaunas.

ANTAŬPAROLO

Antaŭ 40 jaroj en Budapeŝto aperis du krestomatiaj: la unua volumo de *Krestomatio de Esperanta Literaturo. Faktoj, dataro, bibliografio* (KEL) kaj *Baza Literatura Krestomatio* (BLK). La trivoluma KEL (la dua volumo aperis en 1981, kaj la tria en 1982), kompilita de István Szerdahelyi por studentoj de la Esperanto-fako de la universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, prezentis la unuan periodon de la Esperanta literaturo, sed ĉi tiu 500-ekzemplera krestomatio estis apenaŭ konata ekster la medioj universitata kaj literaturologia.

Sed la samtempe eldonita BLK, kompilita de Vilmos Benczik kiel kolekto de specimenoj akompane al la literaturhistoria parto de *Gvidlibro por supera ekzameno*, rapide populariĝis en Esperantujo kiel “literatura minimumo en la esperantista kultura komunumo”. La unua eldono (3500 ekz.) de BLK disvendiĝis en du jaroj, kaj en 1982 aperis la dua eldono (3000 ekz.), al kiu Benczik aldonis la biografian parton por tiuj legantoj, kiuj ne havis la menciitan *Gvidlibron*. En 1986 estis publikigita la tria eldono (2320 ekz.).

Ankaŭ la tria eldono (pli ĝuste, represo de la dua eldono) post kelkaj jaroj estis elĉerpita, sed pro la drastaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj la eldonado de Hungara Esperanto-Asocio ŝrumpis, kaj plia (re)eldono ne sekvis.

BLK de jaro al jaro iĝis ĉiam malpli aktuala, ja la plej freŝa teksto en ĝi (fragmento el *Kiuj semas plorante...* de Éva Tófalvy kaj Oldřich Kníchal) estis verkita probable en 1979, sed dum la sekvaj kvardek jaroj aperis pluraj atentindaj beletraĵoj, kiuj meritis iĝi parto de nia “literatura minimumo”. Ni kontaktiĝis kun Vilmos Benczik, kiu tre volonte permesis al ni pretigi novan eldonon de BLK, kondiĉe ke ĝi enhavu ĉion, kion li elektis, kaj postrikolton kun verkoj de novaj aŭtoroj, kiuj mankis en la tri Budapeŝtaj eldonoj.

En septembro 2018 formiĝis tripersona redakta komitato, kiu fine de la jaro kompilis liston de la aldonendaj aŭtoroj.

Nia tasko estis pli facila ol tiu de Benczik, antaŭ kiu “ne okazis provo kompili libron, kiu pretendas doni superrigardon pri la tuto de

nia literaturo”. Ni povis uzi liajn elektoprincipojn, kaj krome je nia dispono estis la intertempe eldonitaj literaturhistoriaj verkoj CEOLE (Sutton G. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York, 2008) kaj HEL (Minnaja C., Silfer G. *Historio de la Esperanta Literaturo*. La Chaux-de-Fonds, 2015). Ni mem elektis la verkojn de la forpasintaj aŭtoroj, kaj danke al la afabla helpemo de la vivantaj aŭtoroj ni ricevis la tekstojn, kiujn ili opiniis indaj kaj endaj por la aperigo en la kvara eldono de BLK.

“Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu”, – tekstas la Zamenhofa proverbo. Estas klare, ke same kiel Benczik, ni ricevos ne nur laŭdojn, sed ankaŭ riproĉojn, ekzemple, pro tro malmultaj virinoj kaj ekstereŭropanoj inter la aŭtoroj, aŭ pro manko de iu(j) aŭtoro(j) kaj verko(j) en BLK. Ni volonte enmetus verkojn de afrikaninoj aŭ azianinoj, sed, same kiel por nia antaŭulo, la ĉefa kriterio por ni estis ne la sekso aŭ loĝlando de la aŭtoro, sed la literatura valoro.

Post la elektado sekvis la redaktado, kompostado, enpaĝigado, provlegado ktp. Ni redaktis kaj kompletigis la malnovajn biografietojn kaj aldonis la biografietojn de novaj aŭtoroj (la strukturo de la biografioj iom ŝanĝiĝis; nun en ĉiu biografieto post la litero **V** sekvas la ĉefaj libroformaj verkoj de la koncerna aŭtoro).

La dua kaj la tria eldonoj de BLK entenis 134 prozajn kaj poeziajn tekstojn de 59 aŭtoroj. Al ĉi tiu tekstaro ni aldonis du romanfragmentojn de Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová, antaŭe reprezentitaj nur per poemoj. La *Postrikolton* konsistigis 63 tekstoj de 23 novaj aŭtoroj. Rezulte, la nuna eldono de BLK enhavas 199 tekstojn de 82 aŭtoroj.

Ni esperas, ke ĉi tiu krestomatiaĵo estos utila por studentoj de la Esperanta literaturo en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano, kaj en esperantistaj renkontiĝoj, ekzemple NASK kaj SES, kie regule okazas kursoj pri la Esperanta literaturo.

Plej granda laŭdo kaj ĝojo por ni estos ekscii, ke iu el la novaj esperantistoj, traleginte en BLK romanfragmentojn aŭ poemojn, legos ankaŭ la plenajn romanojn aŭ poemarojn, el kiuj estas plukitaj tiuj fragmentoj aŭ poemoj.

Agrablan legadon!

Aleksander Korĵenkov

ENKONDUKO

Kono de la propraj valoroj estas gravega kohezia forto en ĉiu kultura komunumo. Pluroble tiu aserto validas koncerne movadon, kiu ankoraŭ batalas por sia akcepto fare de la socio. Tiu ĉi konscio verŝajne pleje kontribuas al la nuntempa disvolviĝo de la esperantologia studado, kaj ĝi instigis ankaŭ Hungaran Esperanto-Asocion reeldoni la verkon *Gvidlibro por supera ekzameno*, kiu antaŭ deko da jaroj akiris multajn rekonajn.

Pluraj recenzistoj tiam rimarkis, ke maleblas studi literaturhistorion sen literaturaj tekstoj. Tio estas nedubebla vero. Tiu ĉi krestomatio nun eldoniĝas por servi kiel akompana libro de la literaturhistoria parto de *Gvidlibro por supera ekzameno*.

La redakta laboro ne estis senproblema, ja ĝis nun ne okazis provo kompili libron, kiu pretendas doni superrigardon pri la tuto de nia literaturo. Do, mankis firmaj, sankciitaj principoj de redaktado, kaj la redaktinto mem devis elkovi tiajn.

En tiu ĉi verko estas donita plena prioritato al la originala literaturo. Tradukoj eniris la krestomation, nur se la koncerna traduko havis iam aparte gravan rolon en la esperanta kulturo, aŭ, se ĝi venis el la plumo de tradukisto, kiu kreis ankaŭ signifan originalan verkaron.

Opaj verkistoj kaj verkoj eniris la krestomation rezulte de samtempa observado de pluraj vidpunktoj. La plej gravaj vidpunktoj kompreneble estis la propra arta valoro de ies verkoj, kaj samvalide ankaŭ ilia specifa literaturhistoria rolo. (Foje-foje ankaŭ verkoj en si mem ne tre valoraj povas havi gravegan literaturhistorian rolon.) Krome, iam kaj tiam estis reprezentitaj pli amplekse verkistoj, kies verkoj pro iuj cirkonstancoj ne estis sufiĉe legataj, kvankam ili meritis tion. Kaj laste, ricevis pli da paĝoj ankaŭ verkoj, kiuj nuntempe ne estas facile alireblaj. (Kaj post-laste: la redaktinton – kiu estas erarema homo – tre verŝajne influis ankaŭ liaj subjektivaj preferoj ĉe la elektado.)

El la supredirita sekvas, ke oni ne konkludu pri la valoro kaj signifo de iu aŭtoro laŭ la kvanto de la verkoj, aperantaj ĉi tie: prijuĝon oni serĉu en la literaturhistoria parto de *Gvidlibro por supera ekzameno*.

Tamen, ĉe la redaktado konscie mi strebis demonstri la internan kohezion de la esperanta literaturhistorio. Mi klopodis sekvi prijuĝon de la ĝis nun aperintaj antologioj – ĉefe tiujn de la *Esperanta Antologio* de Auld – eĉ tiam, kiam volonte mi estus diskutinta kun ili. Mi faris tion por kontribui al enradikigo de pli-malpli *unueca literatura minimumo* en la esperantista kultura komunumo.

Ion konkrete pri la libro mem. La ordo de la aŭtoroj celas lokigi ilin en la esperanta litaraturhistoria procezo. Tiu lokigo koncernas ĉiam la tutan verkaron de la verkisto, do ne la ĉi tie aperigitan specimenon. Tio kelkfoje aspektas iomete strange, ja ekz. Luyken anticipas kun specimeno el *Pro Iŝtar* (1924) la poemojn de Schulhof, kiuj aperis en 1911 kaj 1912. Tamen, Luyken ankaŭ debutis en 1912 per *Paŭlo Debenham*, kaj fakte liaj verkoj ŝajnas nuntempe multe pli arkaikaj, ol la poemoj de Schulhof.

La jarindikoj sub la verkoj celas doni ĉiam la daton de la unua apero. Tio evidente ne ĉiam sukcesis. Tial, kiam inter la plej frua trovita apero kaj la probable dato de la verkiĝo la diferenco ŝajnis tre granda, mi preferis rezigni pri indiko de jaro. Ĉe tradukoj la jarindiko kompreneble signas la aperon de la esperanta teksto, kaj neniam tiun de la originalo.

Tiun ĉi libron oni konsideru ne antologio, sed krestomatio: kolekto de specimenoj el la esperanta literaturo. Ĝi helpu studantojn de la esperanta beletro, kaj stimulu ilin al pli profunda kono de la verkoj kaj aŭtoroj, specimene prezentitaj ĉi tie.

Al la dua eldono

Tiu ĉi krestomatio forvendiĝis dum nur du jaroj en 3500 ekzempleroj; la jena fakto elokvente pravas la vivan intereson pri la esperanta literaturo. En la dua eldono la redaktinto akceptis la ricevitajn kritikojn, kaj kompletigis la libron per biografietoj de la rolantaj aŭtoroj. Estis aldonitaj ankaŭ kelkaj novaj pecoj de M. Nervi, juna itala talento, kaj fragmento el la premiita romano “Kiu semas plorante...” de Tófalvy-Kníchal.

Vilmos Benczik

Baza Literatura Krestomatio

Ludoviko Lazaro Zamenhof

(1859-1917)

MIA PENSO

*Sur la kampo, for de l' mondo,
Antaŭ nokto de somero,
Amikino en la rondo
Kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
Ŝi rakontas kompatante, –
Mia vundo refrapita
Min doloras resangante.*

*“Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
Kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco?”
Kion diri? Ne ploranta
Povis esti parolado
Kun fraŭlino ripozanta
Post somera promenado!*

*Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
La junecon – mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!*

*Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, –
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...*

*Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro –
Venu tuj al mi la morto,
En espero – sen doloro!*

HO, MIA KOR'

*Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!*

*Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!*

W. Shakespeare: HAMLETO (Fragmento)

*Ĉu esti aŭ ne esti, – tiel staras
Nun la demando: ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn
De la kolera sorto, aŭ sin armi
Kontraŭ la tuta maro da mizeroj
Kaj per la kontraŭstaro ilin fini?
Formorti – dormi, kaj nenio plu!
Kaj scii, ke la dormo tute finis
Doloron de la koro, la mil batojn,
Heredon de la korpo, – tio estas
Tre dezirinda celo. Morti – dormi –
Trankvile dormi! Jes sed ankaŭ songi!
Jen estas la barilo! Kiaj songoj
Viziti povas nian mortan dormon
Post la forĵeto de la teraj zorgoj, –
Jen tio nin haltigas; tio faras,*

Henri Valliene

(1854-1908)

KASTELO DE PRELONGO (Romanfragmento)

– Ne estas tro frue, opiniis Viktoro.

Sed la junulino venis al la fenestro, kaj ĝin larĝe malfermis, volante aerumi sian ĉambron antaŭ la dormado.

Ŝi kubutapogiĝis sur la balustradon, penante sondi per la rigardo la mallumaĵon ŝin ĉirkaŭantan. Sed la nokto estis tiel densa, ke kastelo, parko, vilaĝo, konfuziĝis en la unutoneco de nigra vasteco. Nur la lumo de ŝia lampo, alĵetite de la lumŝirmilo, faris malsupre de la doma muro kvazaŭluman makulon. En tiu parto lumigita troviĝis la piedo de la ŝtuparo, kiun uzis Viktoro: la restaĵo perdiĝis en ombron.

– Nu, diris Matildo: jen ŝtupetaro.

Aŭdante tiujn vortojn, la kapitano, forgesante en kiu loko li troviĝas, faris tre danĝeran kaj preskaŭ pereigan eksalton. Sed li fortege al kroĉiĝis, dum la junulino murmuris mallaŭte:

– Masonistoj venis tiutagmeze; kredeble ili ĝin tie forgesis. Nu, mi ne estas ŝancema hodiaŭ: vitraĵo rompita, fenestra kovrilo kiu ne fermiĝas, ŝtupetaro antaŭ du paŝoj de mia fenestro, se mi estus timema, mi havus tre bonajn motivojn por tremi.

Dum ŝi, senmovigite de tiuj pripensoj, spiris la varmetan aeron de la nokto, ŝi direktis siajn rigardojn al la nenatura ruinaĵo, kiu ŝajnis lumigita, kvankam ŝi ne povis klarigi por kiu kaŭzo kaj per kiu maniero.

– Dinome! blasfemis Viktoro inter siaj dentoj, ĉu ŝi ne baldaŭ enlitiĝos; ĉu ŝi atendigos min ĉi tie ĝis morgaŭ matene? La kapitano maltrankviliĝis, ĉar li sentis sin ekokupitan de rigidigeo, kiu komencis en liaj piedoj. Se li ne konservas sendifekta la uzon de siaj membroj, ĉu li povos eliri el la loko maloportuna en kiu li troviĝas.

Sed post kvarono da horo, fraŭlino de Prelongo reen iris kaj fermis la fenestron.

– Fine, maĉadis la junulo: feliĉe ne estas tro malfrue.

Sed li devis atendi ankoraŭ, dum duono da horo, ke la junulino, kiu ne rapidis, estas sin senvestiginta kaj kuŝiginta en sian liton.

Viktoro ne perdis unu detalon de tiu pornokta tualetto, kaj sentis en liaj vejnoj la ekbruliĝon de dezirega febro. Ĉar fraŭlino de Prelongo estis tiel belega korpe kiel beleta vizaĝe. Ĝis nun, krom ŝia patrino kaj ŝia ĉambristino, neniu povis fanfaroni, ke li konas belaĵojn, kiujn ne eĉ suspektis la kapitano. Hieraŭ lin instigis al tiu entrepreno nur la deziro al la venĝo; sed nun estis la amo, kiu lin ekscitis al ĝia tuja plenumo, amo bruta kaj voluptama, estas vere, sed pro tio pli perforta.

Fine la lampo estingiĝis. La ĉambro de Matildo estis lumigita nur de noktolampo, kies la opala vitroglobo lumigis al ĉiuj objektoj, kiel luna blanka radiado.

La junulo reiris al sia ŝtuparo, malsupreniris teren, kaj ĝin remetis malsupren de la fenestro. Ĉar Matildo estis enlitiĝinta, nun li ne timis plu surprizon: pro tio li opiniis, ke la aliro estos pli facila per la ŝtupetaro senpere staranta sub la fenestro ol per la kornico. Sed li atendis ankoraŭ dum duono da horo, por ke ŝia suferantino havu la tutan tempon necesan por ekdormi.

Tiam li supreniris. La vitraĵo, rompita dum la mateno kaj anstataŭita dum la tagmezo, estis subtenita nur de mastiko ankoraŭ freŝa, kiun sen malfacileco li formetis per la pinto de sia tranĉilo. Poste preninte en sia poŝo malgrandan prenilon, kies li zorge sin provizis, li eltiris delikate la najletojn, kiuj fiksas ankoraŭ la vitraĵon, ĝin tutan formetis, ĝin prenis per sia dekstra mano, enirigis sian brakon maldekstran tra la malfermaĵo, kaptis la fenestrofermilon kaj ĝin turnis. La fenestro senbrue malfermiĝis. La kapitano repuŝis la du duonfenestrojn kaj eniris en la ĉambron, ĉiam tenante la vitraĵon en sia mano. Li rapide ĝin apogis kontraŭ la muron, ĉar ĝi lin embarasis: poste, ferminte la fenestron, li momente pripensis.

La junulino dormis. Sed anstataŭ esti kvieta kiel kutime, ŝia dormo ŝajnis maltrankvila kaj febra, kvazaŭ ŝi sufokiĝus sub la premo de inkubsonĝo. Tiuj ekskuaj gestoj, tiuj nekompreneblaj paroloj elirantaj el ŝiaj lipoj kun tono de teruro, pruvis ke, en sia sonĝo, ŝi penis repuŝi sed sensukcese nevideblan malamikon furiozantan kontraŭ ŝin. Tio estis la sekvo de pripensadoj de ŝi faritaj, kiam ŝi enlitiĝis. Kvankam ŝi estas tre kuraĝa, tamen ŝi estis impresita pro la fariĝoj okazintaj dum la tago, multe pli ol ŝi kredis. Kaj tio reenagis en ŝia dormo.

Viktoro sin preparis, kaj jam estis ŝin ekkaptonta en siajn brakojn,

kaj haltigonta per kisado sur la buŝon la krion, kiun certe ŝi ekpuŝos vekigante, kiam subite Matildo, malfermante la okulojn, stariĝis kaj sidiĝis. Vidante antaŭ si, vestitan kiel kamparanon, tiun viron kiu, pro lia malvera vesto, estis malfacile rekonebla, ŝi volis krii.

La teruro paralizis ŝian langon; kaj nur raŭka sono eliris el ŝia gorĝo. Cetere ŝi ne estis certa ĉu ŝi ne ankoraŭ dormas. En ŝia cerbo duonvekita duondormanta, la sonĝaĵo kaj realaĵo tiel konfuziĝis, ke ŝi kredis daŭrigi la sonĝon komencitan.

La junulo profitis tiun sekundon da ŝanceliĝo. Li rapidis al la lito, sublevis la kovrilojn kaj jam ekkaptis la junulinon per siaj fortikaj brakoj, kiam la malfeliĉa infanino, subite vekita de la malvarmo, rekonis sian atakanton. Baraktante, ŝi ekkriis:

– Viktoro Linŝardo!

– Jes, belulino mia, Viktoro Linŝardo kiu cin amas, kaj kiu tion ekpruvos al ci. Ĉar mi ne povas esti cia edzo, mi fariĝos cia amanto: la afero estos sama.

Tiu malĝentilega cidiro impresis Matildon eble pli dolore ol la restaĵo. Ŝi penis sin liberigi el liaj ĉirkaŭpremoj kaj alvoki helpadon, sed vane.

Ĉar dum li rekomencis sian atakon, premegante per sia tuta pezo la korpon de sia suferantino, la malnoblulo almetis sian manon sur ŝian buŝon por haltigi ŝiajn kriojn.

– Cia sintenado estos vere fiera, li moke murmuretis en ŝian oreilon, kiam ci estos vekinta la tutan loĝantaron. Oni venos al ni; oni cin trovos inter miaj brakoj. Jen estas bela vidaĵo prezentota al sinjoro de Blasano, cia fianĉo.

Fraŭlino de Prelongo sufokiĝis, eĉ stertoris sub la brutaj karesoj de sia atakanto. Sed ŝi havis en vejnoj sangon de antikvaj ferarmitaj herooj; kaj ŝi ne perdis kuraĝon. Konsiderinte ke la situacio estus pereiga por ŝia famo, se oni ŝin surprizus kun Viktoro, ŝi komprenis, ke la kapitano estas prava, sekve ke ŝi devas sin defendi sola. Ĉar la junulo premegis ŝian buŝon per soldataĉa kisado, ŝi mordis lian lipon ĝis sango. Linŝardo aŭdigis malsonoran ĝemadon kaj rapide stariĝis. Profitante tiun momenton de malatento, Matildo lin repuŝis kontraŭ la muron, kaj per unu saltego eksaltis el la lito. Volante ŝin reekkapti, Viktoro streĉis la brakon: sed liaj fingroj nur prenis la noktan veston el maldika tolaĵo, kiu ŝiriĝis kaj restis en liaj manoj, lasante la junulinon tute senvestitan.

(1907)

Julio Baghy (1891-1967)

ĈE SAMOVARO

*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas
la amikoj ekparolas:*

*“Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?”*

*La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan:
“Havi landon, sed perditan...”*

*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume
ili ploras, ploras kune.*

(1926)

SIBERIA LULKANTO

*Hirte flirte flugas haroj,
siblas vintra vent’...
Morde torde ŝiras koron
larmoj kaj la sent’...
Kant’ patrina plore sonas
dormas filo en lulil’...*

*Noktripozon por li donas
sonĝ' infana en trankvil'...*

*“Baju, baju, bajuŝki...
Dormu sonĝe, dormu vi...
Ĝemo, ploro kaj dolor’
flugu for de via kor’!
Baju... baju... bajuŝki...
Dormu filo, dormu vi!”*

*Brue skue blekas vento,
knaras ligna dom’...
Ĝeme treme sin forkaŝas
besto kaj la hom’...
Vent’ alportas sangan krion
tra l’ glacia neĝa val’...
Lastaspire petas Dion
preĝ’ de l’ patro en batal’...*

*“Baju, baju, bajuŝki...
Ho, fileto, dormu vi...
Kri’ de l’ morto, son’ de l’ plor’
flugu for de via kor’!
Baju... baju... bajuŝki...
dormu filo, dormu vi!”*

*Prude krude fremdaj homoj
venas el insid’...
Trompe rompe sangtriumfe
venkas la perfid’...
Kant’ patrina plore sonas,
dormas filo en lulil’...
Teran pacon por li donas
sort’ de l’ patro en trankvil’...*

*“Baju, baju, bajuŝki...
Koro mia, filo, vi...*

*Anĝelete, pala roz'
dormu pace en ripoz'!
Baju... baju... bajuŝki
dormu nur eterne vi!..."*

(1926)

IVAĈJO

*Ivaĉjo estis brava kampobubo,
naiva filo de vilaĝa rond'.
En bluokuloj mankis zorgonubo,
neniom sciis li pri l' granda mond'.
La vivon miris li kun pia timo,
kantadis gaje dum la kamplabor'
kaj sur la pajla lito al patrino
biblion legis dum vespera hor'...*

*Sed venis tempo, mondon detruanta,
kanonoj blekis: buŝo de l' milit'
kaj lin forrabis tiu buŝ' giganta...
Tre orfaj restis – kampo, pajla lit',
sed ili memoris kun kutima pio
pri lastaj vortoj de l' patrin' al fil':
"Ivaĉjo kara, diras la biblio,
armiluzanto mortas per armil'..."*

*La batalkampo en li miron vekis...
Ne greno kreskis tie, sed grenad',
ne birdoj pepis, sed ŝrapneloj blekis,
ne gaja kanto sonis, sed vead'
kaj ne plugilojn, sed pafilojn premis
la fortaj manoj spasme kun furor'...
Ivaĉjo miris kaj elkore ĝemis:
"Ne de la Dio estas ĉi labor'..."*

*Li ĵetis for pafilon, bajoneton
kaj senarmile staris en arme'*

*kaj senarmile ŝturmis drato-reton
kaj senarmile servis en tranĉe'
kaj vanis puno kaj ordon' de l' stabo,
la kapon ĉiam nee skuis li.
Obstine diris la vilaĝa knabo:
"Mi konas nur – dek leĝojn de la Di'..."*

*Perfido... Mortverdiktis la juĝisto
kaj kvin soldatoj tuj fortrenis lin...
Dum lasta marŝo pensis li pri Kristo
pri la biblia krista disciplin'...
Ŝtonkoraj kamaradoj... Pastro mankis...
nur ĉirpis kampa gril' tra l' morta mut'...
Ivaĉjo preĝis, Dion psalme dankis,
mildkore iris al la ekzekut'...*

*Dum ŝargis la soldatoj li subite
ekpalpis ŝarĝon de la panosak'...
En ĝi postrestos pano netuŝite,
patrinfarita pan' el hejma bak'...
Li prenis ĝin, karesis kun kompato...
eklarmis... Kiel peze en la man'!
Ivaĉjo ĝin etendis al soldato:
"Akceptu, frato! Estu via pan'..."*

(1926)

ANTAŬ LA TRIBUNALO

*SinJORAJ moŝtoj, juĝISTOJ bravaj,
min demandantaj pri nia krimo
por la verdikton fari sen timo
laŭ leĝa justo, – vi estas pravaj.
La sanga kulpo min ŝiras morde
kaj kortaŭzantan ŝarĝon mi sentas...
Min ĝi torturas... Min ĝi turmentas...
Konfesos mi do ĉion laŭorde.*

Kálmán Kalocsay

(1891-1976)

EN AMARA HORO

*Nenio estas vi, nenio,
Se, pri la senco sen konscio,
Vi hurlas pri la “nova sento”!
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, fort’ magia:
Dormema “rondo familia”.*

*Ĉu la ĝiskreva himnokanto,
Kolekta, koresponda vanto,
Kaj ke pri gramatikreguloj
Disputas aro de stranguloj
Rajdante sur la Fundamento:
Jen estas do la Nova Sento?*

*Ke rifiĝante de la devoj
Nur gapas vi kun strabaj revoj
Kaj alpreninte dignan pozon
Kelkfoje jetas vi almozon
Sur la altaron de l’ Afero:
Ĉu tio estas do ofero?*

*Mi batas. Fraton batas frato.
Lin mem turmentas ĉiu bato.
Ho, gento, gento, verda gento!
Mi volus scii vin fermento,
Potenca povo, gvida torĉo,
En sorĉ’ malbona – bona sorĉo!*

*Kaj, kvankam “stranga sekto eta”,
Sed fidi, lukti, venki preta,
Por kiu, malgraŭ ĉia moko,*

*La mond-iranta Forta Voko
Ne sangmalriĉa iluzio,
Sed estas kredo, religio!*

*Oferoj nutras la aspirojn,
Postulas ĉiu venk' – martirojn!
Ne kovru palo vian vangon,
Neniu volas vian sangon,
Sed donon, faron, kaj fervoron
Kaj koron, sed la tutan koron!*

*Ve, ĉio vana! Mi konscias,
Ke en dezerto mi forkrias.
Vi restos plue en kvieto
Amuziĝanta societo.
Ho, kie estas la konsolo
Por mi – poeto sen popolo!*

*Poeto sen popolo, ho animprema scio,
Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...
Forsonos senresone la plora melodio,
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko.*

*Ĉu plu projekti, fidi kaj revii malgrandknabe,
Kaj meti mozaikon el la lingveroj splitaj,
Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel Kabe,
Kaj eksilenti – patro de versoj abortitaj?*

*Pli oportune estus kaj certe pli prudente:
La vanajn sapvezikojn plu ne flugigi blove,
Kaj ektirinte ŝultrojn feliĉindiferente,
La “Kanton de la Sklavo” ne kanti plu Schulhofe.*

*Sed kien iri? Kie troviĝas idealo,
Sur kiu mi ne vidus malican ekrikanon,
En kies altartukon, freneze, post batalo,
Neniu adoranto jam viŝis sangon manon?*

*Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora kaj fiera,
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

*Mi konas vin. Enkore vi kantis najtingale
En nokto de la mondo. Vi kiel povis trili!
Vin oni ne aŭskultis, buĉadis sin “reale”...
Ĉu ŝtopu mi l’ orelojn por ilin eksimili?*

*Ne! En la kor’ plusonu la kanto dolĉetrila,
Ho, kantu birdo eta, senforta, kara, kara!
Vi estu mia bela mensogo sorĉebrila,
Vi estu la konsolo en nia mond’ amara!*

(1931)

IRAS ABITURIENT’...

*Dum splena hor’, ĉagrena hor’
Ĉe l’ kor’ min ekkaresis
Arĝentsonor’ de l’ rememor’
Pri l’ tempoj, kiuj ĉesis.*

*Ĝojriĉa temp’, feliĉa temp’
De l’ knab’ facilanima!
Ho, viv-abund’ en korprofund’!
La viv’ estas senlima!*

*Senpena sort’ kaj plena fort’,
Amika rondo varma!
Kortuŝa fid’, plenuŝa rid’
Pri ia farso ĉarma!*

*Ho, ora viv’, ĝojflora viv’,
Flugiloj ĝojfrapantaj!
Malĝoj’ kaj dub’? Facila nub’!
Projektoj dolĉe vantaj!*

*Studenta temp'! Ho, venta temp'!
Aĝ' de printempa vento,
Aĝ' de April': en blanka bril'
Burĝonas knabosento:*

*Naiva am'. Je kiso jam
La lip' soifa estas
Kaj per admir' la amdezir'
La amatinon vestas.*

*Naiva poz': he, sen ripoz'
Nur supren sur deklivo!
Infana song', ho, vana song',
Ĉar vekas zorg' de l' vivo...*

*Reportu brilon al la malĝojanto,
Malnova, kara kant', adiaŭkanto:*

*Iras abiturient'
Jam for...
Adiaŭ, kamarad-tâĉment',
Jam for...
La voj' alhejma antaŭ mi,
Filistro estos ankaŭ mi.
Jam for... al voj'...
Ni kisu nin je l' lasta foj'.*

*Infana song', ho vana song',
Ĉar vekas zorg' de l' vivo,
Kaj svenas ĝoj', kaj venas voj'
Malsupren sur deklivo.*

*En juga dev' la fluga rev',
La song'a mond' ekpalas,
Flugila sving' sen cel-ating'
Lamiĝas, kaj – ni falas.*

*Nenie sav'. Eĉ ama rav'
Ne helpas por leviĝo,*

*Ĉagrenos nin, ke venos fin':
Aŭ tromp', aŭ senreviĝo.*

*Kaj post esper' la malprosper'
Eterna kaj rigida,
Splenis nin, plenigas nin
Per saĝ' vinagr-acida:*

*Por kio lukt'? Acida frukt'
Ja estas la espero,
Kaj ĝi de sur branĉ' sen matur'
Defalos al la tero.*

*Do, lasu nur: viv' pasu nur,
Ĉar estas ver' ordona,
Ke estas mond' kaj restas mond'
Malĝoja kaj malbona.*

*Ho, ploru, ploru kun la esploranto,
Malnova, kara kant', adiaŭkanto:*

*Iras abiturient'
Jam for...
Adiaŭ, kamarad-taĉment',
Jam for...
La voj' alhejma antaŭ mi,
Filistro estos ankaŭ mi.
Jam for... al voj'.
Ni kisu nin je l' lasta foj'.*

(1931)

LA CELOJ ĈIE DRONIS

*La celoj ĉie dronis. Jam emergas
Ĥimeroj por apokalipsa rajdo.
La time trema koro vane serĉas
Eskapon de l' minaca sanga tajdo.*

*Mi vidas jam ĉen-rompi ĉie dise
La mondo-skuan Stulton ĉiopovan,
Kaj dume, delikate, zorge ĉize
Fabrikas tiun ĉi soneton novan.*

*– Kiam anoncis ploro kaj vekrio
Kaj en la noktoj horizonta ruĝo:
“La gotaj hordoj en la Imperio!”*

*En Romo iu staris, sen rifuĝo,
Pensante reve pri l’ Aŭgusta paco,
Kaj flustris kelkajn versojn el Horaco.*

EN ĈI MURDEPOKO

*Subtile kanti en ĉi murd-epoko
pri l’ propra vivo, kiam ja milmiloj
per bomboj, tankoj, pafoj, pendigiloj
pereas, vere ŝajnus aĉa moko.*

*La tuta riĉa poezia stoko:
la luno, steloj, floroj, birdotriloj,
la delikataj amaj maltrankviloj
disflugas en la blov’ de ĉi siroko.*

*La morto regas nun, la mort’ avida,
amasa mort’, vulgara kaj sordida,
sen ciprobranĉoj, sen solen’ majesta.*

*Kaj kiel perdis dignon nun la morto,
la am’ aspektas same io besta:
la ambrakumo ŝajnas seksperforto.*

Lodewijk Cornelis Deij (1919-2011)

AL LA JUDA FORIRINTO

*Li fermis la kofron, manpremis – adiaŭ!
Sen ia protesto li iris... Hodiaŭ
mi tion komprenas; li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Kun kapo klinita la kofron li portis.
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis
sen ia protesto... Li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Kaj iam la filo kun filo parolos,
kaj tiu demandos, la veron li volos.
La mia silentos... kaj povos nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.
Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu diri?
Ke mi kaj ke vi... ni lin lasis foriri.*

William Auld (1924-2006)

LA INFANA RASO

I.

*Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben,
kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben,
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn!*

*Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn
de karavelo hisis kaj sur la mar' piratis
kaj la filinon duan de tavernisto svatis
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute
sur marofundon – kara, mi kantas vin salute!
(Kaj ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,
avino mia praa, al kies mola sino
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris
milite al Polujo, kaj tie vaste viris,
al sia semofluo malfermis larĝe kluzojn,
al mi testamentante milope polajn kuzojn!)*

*Al vi, centmil prapatroj ŝvitintaj sub servuto,
de via tre simila pranepo jen saluto;
sed ege vin surprizus, ke li salutas ame
kiel parenco viajn jugintojn tute same.
Al vi ja ŝajnus strange, ke filo de l' kastelo
kaj via bova ido en trua sklavkitelo
per ia sortkaprico egale kontribuas
al tiu sango, kiu en miaj vejnoj fluas.
(Verdire, la surprizo ne estus via sole:
eĉ pli la kastelfilo min gapus senparole!)*

*Kaj ankaŭ vin, praavaj kaj vilaj sovaĝuloj
kiuj rezistis venke per glavo kaj ŝtonruloj*

*invadajn legianojn de roma Agrikolo –
mi vin salutas: Ave!*

*Jes, tuta ĉi popolo
(aŭ preskaŭ) min generis, laŭ pruvo de ciferoj
montrantaj, ke la sumo de miaj avaj eroj
en tiu tempo estis kelkoble jam pli granda
ol eĉ la tuta sumo de l' loĝantaro landa!*

*Sed ankaŭ en la vicoj atakaj de l' legio
troviĝis pli ol unu patro de mia mio,
kaj kiam glav-al-gorĝe mortluktis murdocele
barbaro kaj romia soldato, jen duele
du homoj reciproke malamis, kies semo
kuniĝis post jarcentoj en mia sola memo.*

*Per dura bato unu breĉas l' alies flankon:
doninto de mia sango fluigas mian sangon...*

*Kaj sen entuziasmo, jen do parenca mano
al vi, prapatro morna, malrida puritano;
jen dorsobat' amika al vi, aktor' ebria,
kies boheman viglon heredis koro mia;
jen kis' al vi, Maria, kiu la pajlon faskis;
mi, vin brakumas, Liza, kiu infanon naskis
sed pri la patronomo neniam estis certa:
pri ama kaj kuira artoj vi estis lerta.
Kaj vin, tajlor-prapatro, salutas mi solene,
kaj vin...*

kaj vin...

vin ankaŭ...

*sed jam la menso svene
rifuzas eĉ koncepti individuajn erojn
de l' disradia ĉeno, gravedojn kaj generojn
kiuj en mi kulminas kaj faras min parenco
en malproksima grado de ĉiu ekscelenco,
de ĉiu almozulo, putino kaj doktoro
de mia land' kaj via, trans lingvo kaj memoro...*

*Saluton, frato, kiu kolportas sur la stratoj –
nin ia malproksima orgasmo faris fratoj!*

*Kaj vi, juĝist' severa – saluton do, amiko!
Nin ambaŭ kreis iam la sama ingvenotiko!
Venu en miajn brakojn frate, nigrulo-plebo:
disigis nin praprae duiĝo de amebo,
kaj vi Jesuo Kristo, el lando brule suna,
vi estas mia frato malgraŭ la haŭto bruna
kiun adeptoj viaj miscle kalkas blanka:
antaŭnelonge nia prapatro estis blanka!*

*Timige amasiĝas patrar' senintermita,
multobligante sin laŭ kvadrato infinita
en la paseon retro, senbreĉa vivoĉeno,
maldika, forta, obstina, fragila vivfadeno,
kiu ekdisvolviĝis kiam kun elemento
kuniĝis elemento pro kosma akcidento
kaj la unua flagro de vivo ekaperis –
ho, tiu nekonebla momento MIN generis!*

*Sed se en iu blinda horo mi min ekzaltas,
mia patraro flustras: ĉe vi la temp' ne haltas!*

*Ne vi, kulmina punkto de nia blinda iro;
post vi tre longe pluen impetos la spaliro;
de nia praamebo ĝis vi – sekundopaso!:
apenaŭ vojkomence sin trovas nia raso.*

*Vi estas nur spireto de bebo novnaskita:
vi venis, iros, ero en ĉen' senintermita!*

Saluton, antaŭuloj, jam pasis via horo...

*Kuraĝon, homofratoj de ĉiu haŭtkoloro –
la tempmiraĝo, kiu disigis nin damninde,
nin fine rekunigos!*

*Kaj dume, palpe, blinde,
ni venas, iras, eroj en ĉeno kies finon
ne formas ni nek vidos. Kuraĝon kaj obstinon!*

(1956)

ANNA

I.

*Anna, diskrura kaj enua,
per distra mano suprentiras
la ŝtrumpon, kaj pro l' hor' vakua
ion nebulan prisopiras,*

*kaj mi, sidante en proksimo,
ekvidas gambon filigranan
kaj, ekpulsante pro l' intimo,
lascive eksopiras Annan,*

*kaj premus kun avid' purpura
vizaĝon inter ŝiaj mamoj,
kusenaj mamoj de matura
graseta spertulin' pri amoj.*

*Kaj certe se mi entreprenus,
eĉ malgraŭ apatia stato
al sia sino ŝi min premus
pro simpatio kaj kompatio,*

*kaj lulus mian kapon milde
sur sia varmodora nudo,
kaj vartus dum momentoj ŝilde
min de l' turmenta vivokrudo.*

*Sed post miraklo de orgasmo –
mi bone scias – venus re la
eĉ pli profunda kormarasma.
Ne solvas splenon fulmo de la*

*kares' pasie senpasia:
mi strebas do al ekvilibro.
Anna, subite rekonscia,
babilas jam pri nova libro.*

II.

*Anna, en ŝtrumpoj kaj kalson’
aspektas vere monumenta:
ŝveba ĝarden de Babilon’
ne estis tiom eminenta*

*kiom la mamoj, je muaro
skuitaj per plej milda mov’
kiel tremola foliaro
pro delikata ventoblov’,*

*kaj la Melosa Afrodite,
de l’ tuta mond’ admirocentro,
ĵaluzus plej senintermite
pri l’ ronda ĉarm’ de ŝia ventro.*

*Sed Anna, antaŭ la spegul’,
sin vidas preskaŭ kun malŝato
kaj zorge notas sen gratul’
la plivastiĝon de l’ formato,*

*kaj sentas, ke forflugas viv’
kaj maljunaĝo venas froste;
sennombraj noktoj de lasciv’
kaj ĝu’ volupta lasis poste*

*impreson malprecizan de
sencelo, vano kaj malriĉo;
ankoraŭ io mankas tre,
ŝin iel fintis plenumiĝo.*

*La lastajn vestojn ŝi demetas
(ebura gamb’, ingvena ambro)
kaj post momento tualetas,
kantante gaje, en banĉambro.*

(1958)

Baldur Ragnarsson

(1930-2018)

PLORO

*Vi estas la ploro de l' nokto
sur verda planed'.*

*Bluaj larmoj gutas
el kriaĵ fontoj
tra ŝvelaj folioj
sur patrinajn manojn.*

La ploro de l' nokto.

*La vojaĝanto ĝemas sub la rokoj,
ratoj rodas radikojn,
kaj la larmofluoj
figuras misterojn
sur verdaj fonoj
kaj varma karno.*

*La ploro de l' nokto
sur nia verda planed'.*

*Torentas la fluoj
ĝis novaj verdoj
per suferaj okuloj,
paligas foliojn.
Bluaj buloj de l' nokto
kunligas palajn fingrojn
por la funebra danco.*

*Vi estas la ploro de l' nokto
vivo, sufero.*

(1958)

Lorjak

(1912-1992)

NEOLOGISME (Romanfragmento)

La prezidanto insistis:

– Komprenu, S-ro Polimiop. Tia situacio estas netolerebla. Tiu persono provoke mokas nin. Ekde la komenco, ŝi elmontris esceptecan talenton de profesia fuŝeco; ŝi supereble ignoras la hortabelon de siaj deĵoroj, venas laŭplaĉe aŭ eliras senkonsidere de la horloĝo, senfine ŝercas kun siaj kolegoj, mokas la klientojn, klaĉas, babilas, vagas senmotive tra la koridoroj, okupas la tempon per multegaj agadoj, krom laboraj. Mi preskaŭ devus diri: feliĉe; ĉar kiam ŝi tuŝas ion, ŝi ŝajnas kore taski akumulon da katastrofoj, miksi la dosierojn, difekti la tajpomaŝinojn, perdi dokumentojn, makuli gravajn pape-rojn, ktp...

Mi aldonu, ke la sinteno de tiu fraŭlino tute ne decas en serioza oficejo: ŝi fumas pli ol malnova lokomotivo, al si farbas la vizaĝon kvazaŭ publikulino, sidas sur la tabloj, kie ŝi senhonte paradas per siaj femuroj el sensacia minijupo, rakontas anekdotojn, kiuj purpurigus la vizaĝon de buĉosoldato... Tia skandalo devas ĉesi. Kaj tuj! Ni jam decidis tion. Kial ĝi ankoraŭ persistas?

S-ro Polimiop streĉis siajn, fortojn:

– Nu, S-ro Prezidanto, bedaŭrinde la afero ne estas tre simpla...

– Kial?

– Mi nenion scias el rekta fonto. Sed promenase onidiraĵoj, kiuj malfaciligas tro rapidan decidon.

– Klarigu!

– Jen: tiu fraŭlino, Amrevas...

– Ĝuste, ŝi tro revas. Ni ne bezonas revulinojn, sed diligentulinojn.

– Pardonu, S-ro Prezidanto, sed vi misinterpretis. Amrevas estas ŝia nomo. Do, tiu fraŭlino Amrevas volonte semas la famon, ke ŝi havas altajn konatojn en konkurencaj firmaoj, kie oni akceptus ŝin senprokraste kun maksimuma salajro.

Lia Prezidanta Moŝto preskaŭ skizis rideton:

– Nu! Despli bone! Mi ne komprenas vin. Mi neniel skrupulos sendi tiun katastrofulinon al niaj konkurenculoj. Ŝi majstre klopodos ĥaosigi ilian negocon, por nia malrekta profito.

– Certe! Sed... pli komplika estas la temo... ĉar aliaj rakontoj vagas...

– Ekzemple?

– Oni diras, ke ŝi konstante konservas kun si portreton de alta estro de nia propra firmao. Mi ne povis scii, kiun. Eble vi, eble mi.

– Stranga ideo. Tamen, kiel gravas?

– Gravas, ke ŝi malice zorgegas igi nin ridindaj. Konsekvence la problemo estas, ĉu estas preferinde, ke ŝi ridindigu nin interne aŭ ekstere. Interne, la danĝero estas pli limigita, kvankam malagrabla proksima. Ekstere, ni ne povas imagi ĝis kie ĝi povas etendiĝi.

– S-ro Polimiop, vi parolas per enigmoj. Kial la fakto ke tiu fraŭlino kunportas portreton de vi, povas igi vin ridinda?

– Ĉar mi ne diris al vi la plej gravan punkton. Ĉiam laŭ babiltruoj, tiun portreton ŝi havas tatuita.

– Burleska ideo! Tatuita! Tatuita kie?

La direktoro pli ol iam aspektis plena je konfuzego:

– Pardonu, S-ro Prezidanto. Sed mi devas diri ĉion. Mi estas tre ĝenata. Tatuita... jes... oni diras... sur ŝia postaĵo.

Tiam, la fluo de l' prezidantaj protestoj ŝajnis barita. Momente, li restis kun buŝo duonferma, blokita en sia impeto. Post ioma tempo:

– Permesu, ke mi ordigu miajn ideojn.

Etosis silento. Kaj:

– Efektive, tiu situacio estas neatendita, kaj instigas pripensojn. Sed, se tio estas vera, kiel gravus ke tiu fraŭlino promenus kun memoraĵo pri vi, kaŝata al ĉies okuloj?

– Ne kulpigu mian aŭdacon, S-ro Prezidanto. Sed tio tre gravus por mi. Plie, mi dubas, ke ĝi estas kaŝata por ĉiuj. Kaj aliflanke, vi ne atentis ke mi ne aludis nur portreton mian, sed eble Vian. Mi ne scias.

(1975)

Postrikolto

Mao Zifu

(1963-)

naskiĝloko

*mi suferis je ĉiuj malsanoj,
nur krom nostalgio.
kvankam en mia manetendo,
tiom da jaroj ekster mi la loko.*

*tamen ĉe kaplevo
mi ĉiam vidis:
floroj mortis de sunfajro,
arboj falis de inundo.
nudaj virinoj ŝarĝatas
per idoj kaj ŝtonoj;
viroj sin distras bubaj
spektante hundparan koiton,
kaj militon de bovoj.*

*mi suferas je nostalgio,
krom korpaj malsanoj.
sur ĉi lokon, mi ektrovas:
la vilaĝanoj duelas por orero.*

*mi volus aĉeti ridon
de kuzinoj per pensio tutjara.
mian nealtan rangon regalas
ĥoro per dancoj sur la manoj...*

eterna distanco

*iam
en proksima malproksimo
vi antaŭtenis vian manon*

*al mi, sed mi rigardis
la ĉielon, starante.
spuroj kaj spuroj paralelis.
mi ne aŭdis vian vokon.
aŭtuno inter ni.*

*kaj nun
en malproksima proksimo
vi etendas viajn manojn
al mi kaj mi gapas
al via rigardo, kuŝante.
la ombro de vi tanĝas
la rondon de mia tombo.
vi aŭskultas mian penton.
mondo inter ni.*

ciklo

*korp' livida balzamon ektrovas,
ve, horloĝo ŝrikaĉas senĉese.
dulcinea bolanta foriras,
en acido remaĉas mi l' kison
tantalige, aŭroro alvenas.
fi, konsolaj kareso kaj suno.*

*mi ekvagas ĉe lago en suno,
koron sago kupida eltrovas.
mieltempo fulmtondre alvenas.
hura, pulsas printempo. senĉese
sang' kaj osto jam dronas en kison.
ĉerk' kaj muroj sufokaj foriras.*

*kaj ĉevaloj, ŝafaro rondiras.
sin etendas verdherboj ĝis suno.
luno donas al mato la kison.
for de digo l' pasion ni trovas
kiel fonton elŝpruci senĉese.
vento ŝvebas. anĝelo alvenas.*

ŝvebas ĝojo. sed zorgo alvenas.
parulmondo la vanta foriras.
ah, al ili mi servas senĉese.
lamp' fariĝas nefala grizsono.
kie nune nektaro sin trovas?
ehe, vivo venenas la kison!

uf, la ŝvit' alkoholas ravkison,
post obskuro la lumo revenas.
en filino delicon mi trovas.
ploro, grumblo kaj stinko foriras.
per ŝi arde ekbrulas orsuno,
la ŝafaro multiĝas senĉese.

rajdas for la filino. senĉese
al mi sendu serafan varmkison.
kaj tenera l' edzin' kiel suno
en neĝvintro. ni kune alvenas
al la lag', sur glaci' zigzagiras,
efeb-ombron pasintan provtrovas.

bisu kison. kaj kisi senĉese.
fendo venas. la sonĝo foriras.
sob la suno. horloĝon mi trovas.

Anna Löwenstein

(1951-)

LA ŜTONA URBO

Alveno en Romo

Baldaŭ la pordo remalfermiĝis kaj jen denove la du viroj. Ĉi-foje estis tiu kun la pufa vizaĝo, kiu vokis nin per gesto eksteren. Ni ŝafece atendis dum ili remetis la ĉenon ĉirkaŭ niajn kolojn, kaj ni ne kontraŭstaris, kiam la junulo forkondukis nin. Li gvidis nin al mallarĝa vojeto inter altegaj muroj, kiuj leviĝis kiel turoj super niaj kapoj kaj per sia minaca rigardo blokis de niaj okuloj la ĉielon. Kien ajn mi turnis mian vizaĝon, mi vidis nenion krom vasta regiono da senviva ŝtono. Tute ne troviĝis verdaj kreskaĵoj. Estis kvazaŭ ni vagus en terura premsonĝo.

Tro pezis sur mi la horora ĉirkaŭaĵo por ke mi detale rigardu, sed mi ricevis konfuzan impreson pri vico de ombraj kavernoj flanke de la vojeto. Dum mi preterpasis ilin, preskaŭ falante, el la angulo de mia okulo mi malklare videtis misterajn, nereconeblajn aĵojn vualitajn de mallumo. Subite du viroj aperis apud mi sur la vojo, kaj komencis malvolvi specon de rulaĵo, kiun unu el ili tenis en siaj brakoj. Ili malvolvis kaj malvolvis kaj malvolvis, dum senfina trembrila strio de ŝtofo pufiĝis kiel ondo, arda kaj ruĝa kiel sango. Mirigite, mi haltis por rigardi, kaj la kateno tuj streĉiĝis ĉirkaŭ mia kolo.

Ni rondiris angulon kaj senaverte trovis nin en la mezo de krieganta, svarmanta homamaso. La afero estis tiel neatendita, ke mi ne tuj rimarkis, ke temas pri la momento kiun mi antaŭtimis dum la tuta vojaĝo. El ĉiuj teruraj hontaĵoj, kiuj povus okazi en Romo, mi ĉiam aŭdis, ke la plej malbona estas tio, ke oni estos kondukata tra la stratoj en katenoj por distri la popolon. Sed kun sento de intensa senpeziĝo, mi vidis nun ke la afero estos multe malpli humiliga ol mi atendis. La homoj ne povus atenti nin malpli. Estis kvazaŭ ni estus vico de bovinoj, kiujn oni kondukas al la paŝtejo.

Intertempe ni puŝiĝis antaŭen kvazaŭ tra solida barilo, dum oni premis kaj ŝovis de ĉiuj flankoj. Ĉie estis bruego de voĉoj. Ie mi aŭdis marteladon. Homoj konstante kriegis malantaŭ niaj dorsoj, kun puŝcaretoj aŭ kun grandegaj ŝarĝoj surŝultre, tiel ke ni devis premiĝi

al unu flanko por ke ili preterpasu. En la mezo de tiu moviĝanta amaso, aliaj homoj okupiĝis tute serene pri siaj ĉiutagaj aferoj: ili babilis, trinkis, raziĝis, fritis kolbasojn, dishakis viandon, pesis manĝaĵojn, trankvile kvazaŭ ili sidus solaj kaj silentaj sur la planko de siaj kabanjoj. Troviĝis eĉ grupo de infanoj, sidantaj en vicoj, kiuj unuvoĉe ripe-tis ion kune.

Super niaj kapoj estis kadukaj, ŝanceliĝantaj konstruaĵoj el ŝtono kaj ligno, kiuj aspektis kvazaŭ ili tuj disfalos. Iliaj flankoj estis plenaj je okuloj kaj vizaĝoj: kelkaj esploris nin de alte, dum aliaj suprenrigardis de sub niaj piedoj. Kiel mi ĉiam aŭdis, la domoj estis konstruitaj unu super la alia, kaj la homoj staris meze en la aero, kie nur malsolida barilo malhelpis ilin falegi rekte al la grundo.

Laŭ la tuta flanko de la vojo estis arkaĵoj, kaj sub ĉiu arko vidiĝis la plej miriga abundeco. Estis grandegaj sakoj plenaj je faboj, je greno, je jam muelita faruno, je nuksoj, kaj je tiom da aliaj aĵoj, kiujn mi tute ne rekonis. Unu fojon mi flaris ĵus bakitan panon, kaj rigardis malsupren laŭ kelkaj ŝtupoj en fajroplenan subgrundan kavernon, kie duonnuda viro, brila pro ŝvito, prenis panojn el forno. La ruĝa ardo de la flamoj respuguliĝis sur lia glimanta korpo, kaj li havis plurajn aĉajn vipostriojn sur la dorso. La forno ŝajnis sufiĉe granda por manĝigi tutan vilaĝon en unu fojo, kaj la panoj estis torditaj en fantaziajn spiralojn kaj ŝvelaĵojn.

Post tio sekvis tuta vico da ĉaregoj, plenegaj je la plej nekred-eble variaj fruktoj kaj legomoj. Inter tiuj, kiuj estis por mi komplete novaj, mi rekonis kelkajn el mia hejmloko: pomojn, ekzemple, sed ĉi tiuj pomoj estis pli grandaj kaj poluritaj ol mi iam ajn vidis, krom en sonĝoj. Se ne temus pri la abomena malpureco de la ĉirkaŭaĵo, mi estus povinta imagi, ke mi pasis tra unu el la transirejoj kie la Alia Mondo tuŝas la nian. Sed tiuj magiaj pomoj estis staplitaj antaŭ ŝmirita muro, kie akvo malrapide glitis malsupren tra verda ŝlimo. Akvo stagnis en truoj ĉe la flanko de la vojo, kaj en unu angulo kuŝis amaso da forĵetaĵoj. Kiam ni preterpasis, trafis min odoro de urino.

Ni marŝis tra unu strato post alia, dum ĉe ĉiu angulo atencis nin la plej strangaj vidaĵoj kaj krioj kaj odoraĉoj; samtempe la homamaso ŝovis nin jen al unu flanko, jen al alia. Unu el miaj ĉefaj impresoj estis tio, ke ĉiuj ĉirkaŭ ni havas frenezan haston kaj ke ni estas devigataj hasti kun ili. En ĉiu dua momento la pufvizaĝa viro turnis sin por kriaĉi kontraŭ ni aŭ por tiregi iun antaŭen per la brako. La ĉeno ĉirkaŭ mia kolo konstante malstreĉiĝis kaj restreĉiĝis, kiam la aliaj junulinoj

treniĝis antaŭen aŭ malantaŭen pro la homamaso. Mi estis devigata vadi senhelpe tra malpuraĵoj kaj akvokavoj, kaj la rando de mia robo makuliĝis de disŝprucinta koto. Plurfoje mi preskaŭ falis super ĉifitaj estaĵoj, kiuj kuŝis surtere prezentante la plej naŭzajn vundojn. Al unu mankis kruro, al alia restis nur stumpoj kiel brakoj. Virino ekkaptis mian robon kaj levis al mi bebon, kies vizaĝon preskaŭ komplete kaŝis inflaminta ulcero. Mi rigardis ĝin kun hororo, ĝis tiris min antaŭen subita streĉo de la ĉeno.

Dum mi premiĝis inter grupoj de homoj, jen kaj jen bloviĝis al mi nekutimaodoro. Pasis iom da tempo antaŭ ol mi konstatis, ke ĝi apartenas al la ĉirkaŭaj homoj. Kelkaj havis oleecan, preskaŭ naŭzan odoron. Aliaj estis strange dolĉaj, kiel floroj. Ĉio ĉi plifortigis mian senton, ke la romanoj estas ne tute homaj. La plejmulto estis tre brunaj; ili aspektis kvazaŭ ili pasigis la tutan someron ekstere en la kampoj. Dise inter tiuj mi vidis aliajn kun eĉ pli malhela haŭto, preskaŭ ledokolora. Unu fojon Albila, kiu sekvis tuj malantaŭ mi en la linio, skuetis mian kubuton. Mi turnis min kaj kriis pro mirego, vidante du virojn, kiuj estis vere komplete nigraj, tiel ke iliaj okuloj kaj dentoj ŝajnis brili per nenormala blankeco. Komprenoble, mi jam aŭdis, ke ekzistas tiaj homoj, sed mi neniam tute kredis tion ĝis tiu momento.

Ni marŝis longegan distancon tra la homoplenaj stratoj. Unu eksterordinara nova vidaĵo sekvis alian, ĝis mi havis la senton, ke de ĉiuj flankoj disbatas min voĉoj, vizaĝoj, objektoj, kaj mi sopiris nur je paco kaj silento. En la fino mi ĉesis rigardi la aĵojn ĉirkaŭ mi, kaj lasis min drivi antaŭen duonsvenante, tra galimatiao de kirliĝantaj bruoj kaj koloroj.

Finfine ni atingis kvartalon, kiu ŝajnis iom pli trankvila. Virinoj staris babilante sub la arkaĵoj, kaj ni vidis grupon de junulinoj de proksimume nia aĝo, kiuj atendis sian vicon ĉe fontano. Ili tute ne atentis pri ni. La viro ekmarŝis pli rapide, kaj ni stumpletis pro la peno ne postresti. Li iris rekte al pordo, kiu aspektis identa al la du apudaj, kaj kondukis nin internen.

Ni trovis nin en mallonga koridoro, kiu malfermiĝis en pli grandan ĉambron. La viro malaperis kaj revenis kun mezaĝa virino de peza staturado. Ŝi alproksimiĝis kaj komencis inspekti nin, en precize la sama maniero laŭ kiu mia patrino ekzamenus ĵus akiritan bovinon. Ŝi detale esploris la manojn de unu junulino kaj palpis la brakojn de alia, dum ŝi intertempe komentis super sia ŝultro al la juna viro. Ŝi eĉ volis levi la jupon de unu junulino – temis pri Etiona – por vidi, kio troviĝas

sube. Kompreneble, Etiona tuj repuŝis sian jupon, je kio la virino eligis gruntan ridon, sed bonŝance ne insistis.

Ŝi ne ŝajnis malkontenta pri sia esploro, kaj kondukis nin al malpli granda ĉambro, kie ŝi lasis nin solaj. Estis la unua momento de kompleta silento, kiun ni spertis dum la tuta tago. Mi estis elĉerpita kun turniĝanta kapo, kaj en la subita malbruo mi ekkonsciis pri siblado en miaj oreloj. Estis speco de ŝtona breto laŭ unu muro, sed ĝi estis tro malgranda por ĉiuj, do ĉar ni estis ankoraŭ kunkatenitaj, ni devis sidi sur la planko. Kliniĝante unu kontraŭ la ŝultro de alia, ni tuj endormiĝis.

(1999)

BIOGRAFIOJ

Adamson, Hendrik [ádamson] (1891–1946). Estona popollerneja instruisto. Verkis Esperante kaj estone. Kunlaboranto de *Literatura Mondo* dum ties dua periodo.

▼ *Dekdu poetoj* (kun aliaj; poemaro, 1934), *Auli* (novelo, 1934), *Vesperkanto* (poemoj, kies tekstoj ofte estas iom ŝanĝitaj fare de K. Kalocsay, 1967).

Auld, William [old] (1924–2006). Skota instruisto, vicedestro de liceo. Prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979–83), vicprezidanto de UEA (1977–80), prezidanto de la Esperanta PEN-Centro (1999–2002). Redaktoro de *Esperanto en Skotlando* (1949–55), *Esperanto* (1955–58), *Monda Kulturo* (1962–63), *Norda Prismo* (1968–72), *La Brita Esperantisto* (1973–2000), *Fonto* (1980–87). Membro de la Skota Skolo. La plej konscia konstruanto kaj propagandisto de la propre Esperanta kulturo. Kompilinto de la antologioj angla (2 vol.: 1957, 1987), skota (1978), Esperanta (1958, 1984), kaj de *Nova Esperanta Krestomatiko* (1991). Plurfoja kandidato por la literatura Nobel-premio ekde 1998 (la unua kandidato, proponita pro verkoj en Esperanto). La unua ricevinto de la titolo La Esperantisto de la Jaro (1998).

▼ *Kvaropo* (kun aliaj; poemaro, 1952), *La infana raso* (poemo, 1956), *Unufingraj melodioj* (poemaro, 1960), *Paŝoj al plena posedo* (lernolibro, 1968), *Humoroj* (poemaro, 1969), *Rimletoj* (kun M. Boulton; poemaro, 1976), *Epifanio* (Ŝekspiro, 1977), *Pri lingvo kaj aliaj artoj* (1978), *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979), *La robajoj* (Omar Kajam / Fitzgerald E., 1980), *La sonetoj* (Ŝekspiro, 1981), *Vereco, distro, stilo: Romanoj en Esperanto* (1981), *Montara vilaĝo* (Chun-Chen Yeh, 1984), *Kulturo kaj internacia lingvo* (1986), *En barko senpilota* (1987), *La graveco de la fideleĝo* (Wilde O., 1987), *La komedio de eraroj* (Ŝekspiro, 1987), *La fenomeno Esperanto* (1988), *La Mastro de l' Ringoj* (Tolkien J. R. R., 1995–97), *Pajleroj kaj stoploj* (prozaĵoj kaj recenzoj, 1997), *La ĉashundo de la Baskerviloj* (Conan Doyle A., 1998), *75 jaroj* (membiografio, 1999), *Jurgen* (Cabell J. B., 2001).

Baghy, Gyula [bági] (1891–1967). Pseŭdonimo: Julio Baghy. Hungara aktoro, esperantisto de 1911, aktiviĝis por la lingvo dum la Unua Mondmilito kiel militkaptito en Siberio. Post la milito sin dediĉis preskaŭ tute al Esperanto: gvidis kursojn, fondis klubojn, vojaĝis kiel Cseh-instruisto ktp. Kunredaktoro de *Literatura Mondo*, ĉefkunlaboranto de *Hungara Vivo* (1961–67). Verkis multajn beletraĵojn kaj lernilojn.

✓ *Bukedo* (poemaro, 1922), *Preter la vivo* (poemaro, 1923), *Viktimoj* (romano, 1925), *Pilgrimo* (poemaro, 1926), *Dancu, marionetoj!* (novelaro, 1927), *Migranta plumo* (noveloj kaj poemoj, 1929), *Hura!* (romano, 1930), *Printempo en la aŭtuno* (romano, 1931), *La vagabondo kantas* (poemaro, 1933), *Sur sanga tero* (romano, 1933), *Verdaj Donkiĥotoj* (prozaĵoj, 1933), *La teatra korbo* (novelaro, 1934), *Arĝenta duopo* (kun K. Kalocsay, jubilea antologio, 1937), *La verda koro* (romano, 1937), *Sonĝe sub pomarbo* (versdramo, 1958), *Koloroj* (novelaro, 1960), *Ĉielarko* (poemaro, 1966), *Ora duopo* (kun K. Kalocsay; jubilea antologio, 1966), *Aŭtuna foliaro* (poemaro, 1970), *En maskobalo* (unuaktaĵoj, 1977).

Baranyai, Imre [báranjai] (1902–1961). Pseŭdonimo: Emba. Hungara pentraĵ-agento kaj oficisto. Unu el la gvidantoj de la hungara laborista E-movado, aŭtoro de lernolibro, romano kaj multaj poemoj, aperintaj en gazetaro kaj en tri poemaroj.

✓ *La profeto* (poemaro, 1934), *Maria kaj la grupo* (romano, 1936), *En ekzilo* (poemaro, 1938), *Ekzilo kaj azilo* (poemaro, 1962).

Bein, Kazimierz (1872–1959). Pseŭdonimo: Kabe. Pola okulkuracisto. Famiĝis per siaj prozaj tradukoj el la pola, rusa kaj germana lingvoj. En 1911 forlasis la E-movadon kaj ne plu okupiĝis pri la lingvo. Li estas rigardata kreinto de populara Esperanta stilmodelo: glata, facile komprenebla, sed fojfoje ne sufiĉe nuancita.

✓ *La fundo de l' mizero* (Sieroszewski W., 1904), *La interrompita kanto* (Orzeszkowa E., 1905), *Elektitaj fabeloj de fratoj Grimm* (1906), *Pola antologio* (1906), *Internacia krestomatio* (1907), *La Faraono* (Prus B., 1907), *Unua legolibro* (1907), *Bona sinjorino* (Orzeszkowa E., 1909), *Patroj kaj filoj* (Turgenev I., 1909), *Versaĵoj en prozo* (Turgenev I., 1909), *En malliberejo* (Ĉirikov Je., 1910), *Vortaro de Esperanto* (1910), *Mia poŝhorloĝo* (Konopnicka M., 1912).

Berveling, Gerrit (1944–). Nederlanda instruisto kaj remonstranta pastoro. Prezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA, 1993–2003), la lasta redaktoro de *Fonto* (1993–2006). Unu el la plej fekundaj E-aŭtoroj kun 82 libroj originalaj kaj tradukitaj, aperintaj plejparte ĉe lia eldonejo *VoKo* kaj ĉe *Fonto*.

✓ *Apologio* (Tertuliano, 1980), *Tri 'stas tro* (poemaro, 1987), *Laŭdo de l' stulteco* (Erasmus de Roterdamo, 1988), *Oktavia* (Seneko, 1989), *Kanto pri Minotaŭro kaj aliaj poemoj* (1993), *Mia pado: tekstoj el 25 jaroj* (1997), *Fadenoj de l' amo* (romaneto, 1998), *Nombroj* (Biblio, 1999), *Ajnasmajne* (romaneto, 2006), *Vojaĝimpresoj el Siberio kaj Japanio* (2008), *Fatalo* (Couperus L., 2008), *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj* (Couperus L., 2008), *La Duanonaj Libro* (Biblio, 3 vol.: 2001–08), *Odoj & aliaj poemoj* (2009), *La Nova Testamento* (3 vol.: 2004–10), *Pri maljunuloj, la aĵoj, kiuj pasas...* (Couperus L., 2013), *Antologio latina* (5 vol.: 1998–2014), *Konciza historio de Kristanismo* (2014), *Mallongeco de la vivo* (Seneko, 2014), *La regulo* (Benedikto, 2015), *Legu po-ete: Krestomatio tradukaĵa el pluraj jardekoj* (2017).

ENHAVO

Korĵenkov A. Antaŭparolo	3
Benczik V. Enkonduko	5
Zamenhof L. Mia penso.....	8
Ho, mia kor'	9
Shakespeare W. Hamleto (Fragmento)	9
La Sankta Biblio (Fragmento).....	10
Parolado ĉe la Unua Kongreso en Bulonjo-sur-Maró (Fragmentoj)	13
Preĝo sub la verda standardo	16
Grabowski A. Puŝkin A. La neĝa blovado (Fragmento).....	18
Mickiewicz A. Sinjoro Tadeo (Fragmento)	19
Sur unu kordo.....	22
Waŝniewski J. En la brikejo (Fragmento).....	24
Devjatnin V. Nokto senstela	27
Puŝkin A. Ruslano kaj Ludmilo (Fragmento).....	27
Pariza Esperanta Semajno.....	29
Bein K. (Kabe) Prus B. La faraono (Fragmento)	30
Vallienne H. Kastelo de Prelongo (Fragmento)	32
Braun S. Z. Mi kantis	35
Karolczyk S. Demando.....	37
Luyken H. Pro Iŝtar (Fragmento).....	39
Schulhof S. Desperanto	43
Kanto de l' sklavo	44
Privat E. Lasta kiso	45
Ginevra (Fragmento)	46
Rajczy R. Teatro.....	48
Mihalski E. "Jam superfluas vortoj..."	49
Ajno (Fragmento)	50
Bulthuis H. J. La vila mano (Fragmento).....	52
Forge J. Abismoj (Fragmento)	56
Baghy J. Ĉe samovaro	60
Siberia lulkanto	60
Ivaĉjo	62
Antaŭ la tribunalo.....	63
Estas mi esperantisto	66
Hura! (Fragmento).....	68

Sonĝe sub pomarbo (Fragmento)	72
Deziro de grandveziro	76
Kalocsay K. En amara horo.....	78
Iras abiturient'	80
La celoj ĉie dronis	82
En ĉi murdepoko	83
Letero al William Auld	84
Petőfi S. Fino de septembro	88
Puŝkin A. Letero de Tatjana al Onegin (Fragmento).....	89
Madách I. La tragedio de l' homo (Fragmento).....	91
Heine H. La teksistoj	95
Hohlov N. Mia vojo.....	97
Eŭropo	97
Vintra fabelo	99
Schwartz R. Esperantisto, ekesto kaj malapero.....	100
Pri kartoj migrantaj.....	101
Kiel akvo de l' rivero (Fragmento).....	102
Varankin V. Metropoliteno (Fragmento)	104
Engholm S. Homoj sur la tero (Fragmento)	108
Dresen H. Vintra luno	110
Visnapuu H. Orflava kanto	110
Kalevipoeg (Fragmento)	111
Tárkony L. Triopa trista gard'	113
En hospital-fenestro.....	114
Noktiĝo.....	115
József A. Saluto al Thomas Mann.....	116
Adamson H. Infera regalo	117
Vesperkanto.....	118
Price-Heywood B. Kiom longe atendi?.....	119
Newell L. La ruĝa tramo aŭ: Printempo en Londono	122
Shakespeare W. Hamleto (Fragmento)	123
Georgo E. Maŭra. Litanio.....	124
Jesaja 53	125
Ķurzēns N. Ĉu tio do – la vivo?	128
Aŭtuna elegio.....	128
Baranyai I. Mi	129
Eterna lulkanto.....	130
Saint-Jules Zee. La sorĉa ponto.....	132
Lejzerowicz I. El la “Verda Bibio” (Fragmento)	133
F. V. Dorno. Levu la manojn! (Fragmento)	135
Pumpr T. Foirfesta kanto pri Esperanto-instruisto	138
Szilágyi F. Vivraporto	142
Mistero minora (Fragmento).....	143
Deij L. C. Al juda foririnto	148

Thorsen P. Mi metos kandelon	149
Rossetti C. Kredu min, Sinjorino! (Fragmento)	150
Rossetti R. M. Glasgovo nokte	153
Balado	154
Banu vin, mia bela	155
Shakespeare W. Romeo kaj Julieta (Fragmento)	159
Dinwoodie J. S. La Venkonto	163
Serenu, zefiroj	164
Dornoj kaj rozoj (Fragmento)	165
Auld W. La infana raso (Fragmento)	166
Anna	169
Unu el ni	171
Evoluo	171
Geedzoj	172
Bonan matenon, majstro	173
Blake W. La tigo	174
Francis J. I. La granda kaldrono (Fragmento)	175
Al malfruantaj solenontoj de la Tago de Rememoro	178
Piç K. Almozula kanto	179
La litomiŝla tombejo (Fragmento)	180
Rosbach J. H. Fianço de l' sorto (Fragmento)	183
Mattos G. Soneto 101	186
Soneto 108	186
Boulton M. Nenaskotaj infanoj	188
Amaraj sonetoj (Fragmento)	189
Luno	190
Ĉe la muro de Hadriano	190
“Dormi kun vi...”	191
Aliĝilo	191
Szathmári S. Vojaĝo al Kazohinio (Fragmento)	193
Ragnarsson B. Ploro	198
La kondamnitoj	199
Vi skribis pri la vitroj	199
Hamri Th. F. Himno	201
de Kock E. Kvin elementoj (Fragmento)	202
Mateo 25: 41-45	203
Sud-Afriko	204
Lasta sopiro	204
Lamento	207
Urbanová E. Nia strato	208
En songo nur	208
Hetajro dancas (Fragmento)	209
Ribillard J. Salomono kaj la oaza nimfo	213
Masao Miyamoto. La lasta te-seanco (Fragmento)	216

Aŭtuno lante	218
Okinawa.....	218
Conterno Guglielminetti C. La krono	220
Sadler V. La mev-gardanto	221
“Mi ĉizus kantomilionojn...”	221
Pledo.....	222
Goodheir A. Merlo sur menhiro	223
Armada	223
Pantunoj.....	224
Kontraŭ bombkultistoj	224
Lorjak. Neologisme (Fragmento).....	225
Valano J. Ĉu vi kuiras ĉine? (Fragmento).....	227
Nervi M. Poetiko.....	229
La tertremo.....	231
Tófalvy É., Knichal O. Kiuj semas plorante... (Fragmento).....	234
Postrikolto.....	237
Tóth E. Groto	238
Berveling G. La senco de la vivo.....	243
Tristas tre	244
Frua patristiko	247
Johansson S. Tri legendoj.....	250
Carr T. Vento	255
La renkontiĝo	255
Invadoj	256
Nemere I. Jesa (Fragmento).....	257
Štimec S. Hodler en Mostar (Fragmento).....	261
Modest J. La senĉesa veturado	266
Camacho J. En finna feri-domo	273
Alko kaj boaco	273
Ebenaĵoj.....	274
Perplekso	274
Araneo	275
arto poezia.....	275
la naturo	276
parenteze.....	276
strande.....	277
homade.....	277
“absolutan obskuron...”	278
trans fenestro	278
La zombioj.....	278
Mirinde.....	279
tunelojn.....	279
Ne aparte.....	279

Al untaj poetoj	280
Steele T. Amo inter ruinoj (Fragmento)	281
Vaha B. Adolesko (Fragmento)	287
Williams K. Joyce	292
Akuŝoj.....	293
Matthias U. Fajron sentas mi interne (Fragmento).....	294
Fernández Martín M. El nia nio inta – du lamentoj.....	298
Konstanta amo transe de la morto.....	298
Lasta kanto: Memore al Fabienne Berthelot.....	302
Montagut A. El Karnavale: “Nun ĝuste la skurgisto...”	304
El Karnavale: “Kaj pri l’ beba bubineto...”	305
El Karnavale: “Glutemuloj satiĝadas...”	306
Poemo de Utnoa (Fragmento)	306
Mao Zifu. naskiĝloko	309
eterna distanco.....	309
ciklo.....	310
Löwenstein A. La ŝtona urbo (Fragmento).....	312
Karpunina L. La bato	316
Philippe B. Guayaquil	320
Atena taverno	320
Olivero aŭ Pri sinmortiginto	321
Matthias	321
Ruggiero N. Okazo ripoza.....	323
La korva plumo.....	323
Westover T. Ruĝvela ŝipo.....	326
Silas P. Esto.....	332
Esto.....	333
Moinhos S. La siamaj luktistoj	334
Muta	334
La najbarino de la sepa etaĝo.....	335
Valén A. Ama fer’ iama	336
Paralele.....	337
Floron puran.....	338
Grandurba mateniĝo	338
Tagmezo	339
Varma-somere	339
Fendoj.....	340
Benczik V., Gorecka H., Korĵenkov A. Biografioj.....	341
Enhavo.....	361

ESPERANTAJ LIBROJ EL RUSLANDO

Libroserio *Scio*

La kleriga libroserio *Scio* estis lanĉita en 1994. Nun en ĉi tiu projekto partoprenas ankaŭ Litova Esperanto-Asocio.

Nº1. Zamenhof L. *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto; Sezonoj, 1994.

Nº2. Zamenhof L. *Kongresaj paroladoj*. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1995. (2a eld.: Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2015)

Nº3. Pokrovskij S. *Lingvaj respondoj*. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1999.

Nº4. Gorecka H., Korĵenkov A. *Esperanto en Ruslando*. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000.

Nº5. Korĵenkov A. *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj, 2005.

Nº6. Zamenhof L. *Mi estas homo* / Kompilis A. Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2006.

Nº7. Duliĉenko A. *En la serĉado de la mondlingvo, aŭ interlingvistiko por ĉiuj* / Tradukis el la rusa A. Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2006.

Nº8. Korĵenkov A. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2009. (2a eld.: Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2011)

Nº9. Korĵenkov A. *Zamenhof: Biografia skizo*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2010.

Nº10. Gorecka H., Korĵenkov A. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj*. Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2018.

Serio Mondliteraturo

Nº1. Mitchell J. L. *Spartako* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993.

Nº2. Fernández-Flórez W. *La malica komizo* / Tradukis el la hispana F. de Diego. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993.

Nº3. Tolkien J. R. R. *La Kunularo de l' Ringo* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1995. (2a eld. 1997, 3a eld. 2007)

Nº4. Tolkien J. R. R. *La du turegoj* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1996. (2a eld. 2007)

Nº5. Tolkien J. R. R. *La reveno de la Reĝo* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. (2a eld. 2007)

Nº6. Conan Doyle A. *La ĉashundo de la Baskerviloj* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. (2a eld. 2010)

Nº7. Simenon G. *Maigret hezitas* / Tradukis el la franca D. Luez. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999.

Nº8. Carroll L. *Alico en Mirlando* / Tradukis el la angla D. Broadribb. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. (2a eld. 2004)

Nº9. Tolkien J. R. R. *La hobito* / Tradukis el la angla C. Gledhill kaj W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. (2a eld. 2005, 3a eld. 2013)

Nº10. Cabell J. B. *Jurgen* / Tradukis el la angla W. Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 2001.

Nº11. Carroll L. *Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie* / Tradukis el la angla D. Broadribb. Jekaterinburg: Sezonoj, 2001.

Nº12. Simenon G. *Maigret kaj la maljuna damo* / Tradukis el la franca D. Luez. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Nº13. Simenon G. *Amiko el la infanaĝo de Maigret* / Tradukis el la franca D. Luez. Kaliningrado: Sezonoj, 2004.

Nº14. Simenon G. *La flava hundo* / Tradukis el la franca D. Luez. Kaliningrado: Sezonoj, 2007.

Nº15. Verne J. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* / Tradukis el la franca J.-L. Tortel. Kaliningrado: Sezonoj, 2008.

Nº16. Borges J. L. *La sekreta miraklo* / Tradukis el la hispana J. Camacho, G. Cappa, T. Chmielik, F. de Diego, L. Dek, I. Ertl, H. García, K. Long, G. Neves, J. Sarasua, F. Veuthey. Kaliningrado: Sezonoj, 2008.

Nº17. Simenon G. *Maigret eraras* / Tradukis el la franca D. Luez. Kaliningrado: Sezonoj, 2009.

№18. Conan Doyle A. *La aventuroj de Ŝerloko Holms* / Tradukis el la angla I. Ertl, H. Firooznia, R. Fössmeier, E. Grimley Evans, P. Gubbins, S. Johansson, T. Steele, R. Williams. Kaliningrado: Sezonoj, 2013.

№19. Schlink B. *La legisto* / Tradukis el la germana J.-L. Tortel. Kaliningrado: Sezonoj, 2013.

Serio Rusa literaturo

№1. Ĉeĥov A. *Sveda alumeto* / Tradukis A. Korĵenkov, V. Kudrjavcev, A. Parfentjev, A. Zagvazdin, EK Revo. Sverdlovsk: Sezonoj, 1991.

№2. Turgenev I. *La unua amo* / Tradukis A. Korĵenkov, V. Kudrjavcev, I. Novikova. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993.

№3. Lermontov M. *Princidino Mary* / Tradukis N. Danovskij. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996.

№4. Tolstoj L. *La morto de Ivan Iljiĉ* / Tradukis V. Melnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997.

№5. Brjusov V. *Kvar noveloj* / Tradukis G. Arosev, A. Korĵenkov, I. Novikova. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999.

№6. Tolstoj L. *Resurekto* / Tradukis V. Sapoĵnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000.

№7. Ĉeĥov A., Bunin I., Nabokov V. *Rusaj amnoveloj* / Tradukis G. Arosev, A. Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000.

№8. Dostojevskij F. *Blankaj noktoj* / Tradukis G. Arosev, A. Birjulin, A. Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

№9. *Rusa Novelaro. La 19a jarcento* / Tradukis G. Arosev, A. Birjulin, H. Gorecka, A. Grabowski, V. Jurganov, A. Korĵenkov, V. Melnikov, N. Lozgaĉev, I. Novikova, S. Pokrovskij, D. Staritsky, T. Vŝivceva, V. Vyĉegĵanin. Kaliningrado: Sezonoj, 2003.

№10. Ĉeĥov A. *Ĉeriza ĝardeno* / Tradukis A. Birjulin, A. Korĵenkov, V. Kudrjavcev, V. Melnikov, An. Parfentjev, A. Pentus, M. Pentus, T. Vŝivceva, V. Vyĉegĵanin, A. Zagvazdin. Kaliningrado: Sezonoj, 2004.

Baza Literatura Krestomatia estas la 121a libro eldonita de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Niaj libroj aĉeteblas en la libroservo de UEA kaj en aliaj libroservoj. Pliajn informojn pri niaj libroj vidu en niaj retejoj:

<http://sezonoj.ru>, <http://esperanto-ondo.ru/>